

l'esperanto

1979:7-8

revuo de itala esperanto-federacio



Enhavo

- novaj vojoj por la esperanta muziko
aldo de' giorgi
- interlingvistika seminario: sekvinda
ekzemplo —
- pri virina agado *anna brennan*
- por vi kaj por viaj neverdaj amikoj
renato korseti
- kafpaŭzo *bruĉjo kasini*
enketo pri tagmeza murdo
vojislav kuzmanović
- klačangulo *ermes*
- hiroŝima: un'esperienza di ieri per una
realtà di oggi *michela sato-lipari*
- leteroj al la direktoro
salvatore argentino, verona
- sonrevuo en esperanto *marinko ĝivoje*
- la foiro de la veraĵoj
clelia contemo guglielminetti
la fenomeno svislando *renato korseti*
- interesa statistiko *(mundo)*
- nova sento *mauro nervi*
ijk en nederlando rigardis eksteren
stefano mac-gill

anno 57 — luglio-agosto 1979

sped. in abbon. post. gr. III/70 — reg. del
tribun. di milano, n. 85 del 27 feb. 1970

direttore responsabile: antonio de salvo,
casella postale 4017, 00100 roma appio
redazione tecnica composizione e grafica:
edistudio, casella postale 213, 56100 pisa

amministrazione: fei, via villoresi 38,
20143 milano, pĉk. (c.c.p.) 37312204
stampa: vallerini offset, pisa

gratis ai soci — un numero lire 500
*la opinioj esprimataj en la artikoloj sub-
skribitaj ne necese koincidas kun tiuj de
la direktoro de ĉi tiu revuo — nur la
oficialaj komunikoj, krome, esprimas la
opinion de itala esperanto-federacio.*

surkovrile: *dum la fusa 50a Itala Kon-
greso de Esperanto (kies raportoj estos
sur la venonta revuo) estis i.a. prezent-
ita la poemtraduko "Blinda Ermito"
de Maurizio Caprile, eldono de Edistu-
dio, Pisa. (foto Neri, Livorno).*

*La plej unuaj informoj de la 50a
Itala Kongreso de Esperanto, okazinta
en Jezolo, estas la nova prezidanto de
la Itala Federacio, d-ro Mario Dazzini,
kaj la nova redaktoro de la revuo, s-ro
Aldo de' Giorgi.*

*Kun la dankoj al la intaj aŭtoritatoj,
kaj al la novaj la gratuloj kaj bondez-
iroj, kiujn ni peras de la tuta itala
movado, venas la afabla peto pri kun-
laboro.*

*Por ke ĝi kiel eble plej efiku, ni tuj
nun mencias la adreson de la redakcio,
valida por la numeroj eke de januaro
1980, kiujn tamen oni devas plani suf-
iĉe pli frue: Aldo de' Giorgi, via Mar-
tino Anzi 19, 22100 Como, Italujo.*

Helpu nin akurati.

Bruĉjo Kasini.

Novaj vojoj por la esperanta muziko.

Ekzamenado de la statistikaj ciferoj pri la diversgenraj eldonitaĵoj aperintaj en la internacia lingvo, en la daŭro de ĝia pli ol naŭdek-jara ekzisto, povas liveri interesajn instruojn. Kaj kelkajn surprizojn. Oni povas rimarki, ekzemple, ke la presitaĵoj, kiuj rilatas al muziko (broŝuroj, muzik- kaj kanzon-tekstoj, diskoj k.s.) estas proporcie pli multnombraj ol oni povus unumomente pensi: proksimume 3% el ĉio aperinta. Por komparo ni povas mencii, ke la verkoj pri teatro estas 1%, la prisciencaj 5%, la prireligiaj 10% ktp.

La regulaj vizitantoj de la esperantistaj kunvenoj, renkontiĝoj, kongresoj k.s. verŝajne havis okazon konstati, kiel ofte oni stumblas kontraŭ tiuj insistaj disdonantoj (kontraŭpage!) de ĉiaspecaj kantkolektoj. Mi eĉ supozas, ke ĉiu unuopa grupo almenaŭ unufoje ellaboris sian propran "kantareton".

Ankaŭ muzikaj diskoj neniam malabundis ĉe ni.

Sed la kvalito!

Kun malmultaj esceptoj ("Duo espera" kaj... kio alia?) temis preskaŭ ĉiam pri mod-estaj broŝuretoj kun kolekto de popularaj kanzonoj el la internacia folkloro (ĉiam la samaj), pri naivaj verdaĵoj, pasintjarcent-stilaj ŝvarcaĵoj aŭ aliaj banalaĵoj tiaj.

Dum jardekoj la reĝino de la esperantlingvaj refrenoj estis "vivulavivulavivulastel".

Grude kaj senescepte la spektantoj de la t.n. "Artaj vesperoj" de niaj universalaj kongresoj entuziasmiĝis (por tiel diri) pro la dekadencaj siropajoj de Margaret Hill aŭ la melodramaj triloj de Maria Angelova. Kiam ne pli infre!

Nur la ĉi-jusaj lastjaroj nova spirito

traventis -- feliĉe kaj finfine -- la esperantisman mondon muzikan. Kaj ankaŭ tiuj "Artaj Vesperoj" fariĝis malpli dormigaj, malpli eksmodaj, finfine preskaŭ sinkronaj laŭnivele kun la plej aktualaj tendencoj mondskalaj, ĉefe en la kampo de la kanzonarto.

Kiujn danki pro tio?

Jes, ankaŭ nian "seriozan" muzikan mondon. Fakte, eble unufoje en la historio de niaj mondaj manifestacioj, okaze de la pasintjaraj kongresoj en Bulgarujo la nekompleze postulema publiko de ties muzikaj vesperoj ne estis devigata honti pro la difino "profesia artnivele", ĝenerale tro facilanime atribuita antaŭe al operkantistoj sursceniĝintaj en niaj mondaj renkontiĝoj. Unufoje alterniĝis sur la kongresaj scenejoj pluraj, vere altvaloraj, profesinivelaj artistoj de la klasika muziko.

Sed, pro tiu citita pliboniĝo, ni devas ĉefe danki kaj komplimenti la junularan movadon, la novajn generaciojn. Kiuj ne plu kontentiĝas per "Sankta Luĉia", "Kara Klementin'" aŭ "Mariŝa kisu min", sed aŭtoritate enkondukis en nian kantarenon la plej ĝisdatajn, gusteriĉajn, allaboritajn trendojn.

Por la junaj homoj de nia aktuala movado la tekstoj de la kanzonoj kantotaj dum la kunvenoj ne plu povas resti preskaŭ ekskluziva monopolo de kelkaj duonanalfabetaj, facilgustaj "parolistoj". Do, en tiu kampo debutas kelkaj el niaj plej preparitaj kaj elstaraj intelektoj. Nun la kanzontekstojn liveras nomoj, kiaj Claude Piron, Renato Korseti, Georgo Lagrang', Jean Pierre Danvy, Giulio Cappa, Vittorio Dall'Acqua, Stefano MacGill,... Humprey Tonkin. Aŭ, alternative,

oni provizas per muziko la poemojn de niaj plej bonaj aŭtoroj: Auld, Boulton, Ueyama, Maŭra, Baghy, Clark... Zamenhof.

Dise ekaperadas muzikdiskoj kaj, ĉefe, kasedoj. Kaj ties kantisto-aŭtoroj subite alproprigas al si la atenton kaj la entuziasmon de la “distraj vesperoj” ĉekongresaj. Kaj ne nur de la junularaj. Tiuj kantistoj – ĉiuj kun sia fidela gitaro – impone enpaŝas nian, nun pli serioziĝintan kaj plibuntigitan mikrokosmon muzikan. Jen, tie nun svarmas kaj majestas Ĝanfranko Molle, Ĵak’ Lepŭil’, Ĝuljo Kapa, Olivier Tzaut.

Kelkaj eĉ reproponas la kabaretan ĝenron kaj sukcese renovigas – en moderna klefo – la iamajn provojn de Raymond Schwartz. Ja, la modernaj gustoj de la publiko postulas, ke kantisto estu samtempe ankaŭ aŭtoro, ludisto, aktoro, kabaretisto.

Aparta fenomeno estas Claude Piron, kiu transportas en Esperanton la animon (ne la folkloron) de la plej diversaj popoloj kaj klopodas krei internacian, kunfandan etoson kantmuzikan, remulditan simbiozie per la internacia lingvo. Kaj li ne estus povinta trovi pli adekvatan interpretiston ol Olivier Tzaut.

Sed jen kelkaj titoloj de la plej furorintaj aperintaĵoj lastatempaj: la disko “Tra l’ mondo”, la kasedoj “La vojo”, “Danĝera ul’”, “Horo da opozicio”, “Venos liber’”, “Kontakto”. Aliaj estas survoje.

Por ne paroli pri la klasika (kaj same furora) disko de Veselin Damianov, kies pritakso estas tamen ekster nia kompetenco kaj volo.

La lastaperinta estas la kasedo “Kontakto”, al kiu mi deziras dediĉi kelkajn apartajn vortojn.

Ĝi aperis sub marko “Muzika kulturo”, zorge de “Edistudio” de Bruĉjo Kasini kaj kun la aŭtonomo “Ĝanfranko”.

Persone mi havas nenium dubon, ke ĝi renkontos la saman sukceson, kiel la unua de Ĝanfranko, “La vojo”. Tamen mi hezitas atribui tiun sukceson ekskluzive al la ĉarma voĉo, al la nekutima prezentvirtuozo, al tiu senduba “ŝarĝo de simpatio” (pardonu la italismen) de nia Ĝanfranko. Mi emas kredi,

ke la nepre eksterordinaraj kvalitoj kaj novismo de tiu kasedo rezultigas el la feliĉa, ne-hazarda kunfando de pluraj, diversaspektaj sed centripete harmoniigintaj talentoj: unue tiu de Ĝanfranko, memkompreneble, sed ankaŭ la obstina persisto kaj vulkana entreprenemo de Bruĉjo (Kasini), la kalejdoskopa satirgenio kaj funda preparo de Renato (Korseti), la grimaca intelektemo de Ĝuljo (Kapa). Kaj ankaŭ la kontribuo de tuta aro da engaĝituloj, kiuj kelkmaniere kunlaboris aŭ simple ĝin favoris per stimuloj, kuraĝigoj, per kreado de la necesa, konvena etoso: Honfri (Tonkin), Spomenka (Ŝtimec), Stefano (MacGill), Nino (Vesela), Ĵak’ (Lepŭil’) kaj aliaj.

La kasedo estas sendube pli moderneca, pli kuraĝa, pli intelekta, pli malstereotipa ol la antaŭaj. Eksterlasitaj preskaŭ tute ĉifoje la nostalgiaĵoj, la folkloraj ŝablonoj, la leĝeraj patosaĵoj. Sed kio plej distingas ĝin, tio estas – kiel Ĝanfranko mem deklaras en enkondukaj vortoj – ke ĝi esence “verdecas”. Sed neniu kredu, ke temas pri la kutimaj verdaj aĵoj. Movadozajn temojn oni povas alfronti diversmaniere: per la tradiciaj, naive idealcaj, romantike fanfaronetaj kliŝoj aŭ – kiel en nia kazo, tiom pli trafe – per la armiloj de satiro, paradokso, primoko. Kaj tiujn rimedojn ekspluatas Ĝanfranko, Renato, Ĝuljo, Stefano. Ili faras la cetero lapalisan malkovron, ke nia movado ne estas nur tia idilia mondo prikantita ĝis nun (“la diligenta kolegaro”, “la plej granda familio”, “la pabatalantoj” k.s.) sed ke en ĝi – multe pli realisme – nestas ankaŭ la ĉieaj ĵaluzoj kaj konsekvencaj militoj, la fanfaronajoj, la strangaj uloj, la anakronismoj. Kaj tiajn aspektojn de nia spinace verda mondo (kiel diras Spomenka en la spritbrila enkonduko), ĝiajn groteskajn facetojn Ĝanfranko interprete kantas: ŝpruce, ŝoke, ironie. Sed ĉiam dolĉeharmonie kaj neniam sakrilegie. Eĉ kiam li modulas nian oficialan himnon laŭ la ekzotikaj skandoj de la negraj “blues”, aŭ ĝin alivestas per la antipodaj versoj (hipotezitaĵoj de Renato. Sed, ĉu vere nur hipotezo?) de iu “eksterokcidenta dialekto”. Aŭ kiam li historias pri la fifama “Hamburga puĉo” (simple delica!). Aŭ pri la ĉionpova “Centra

Oficejo de UEA". Aŭ inventarias pri "tiuj, kiuj..." (jes, ĉiu el ni povus rekoni sin en iu el tiuj "kiuj"). Aŭ embleme ludas per tiu Tonkina sintezjuvelo "hodiaŭ ni zipus kaj malzipus nin per la inventaĵo de Zamenhof".

Jen, mi intence nur skizis kelkajn scivolitklajn aludojn pri la riĉe provoka kasedenhavo.

Laŭ mi tiu ĉi nova, multaspekte aŭdaca eldono de "Edistudio" estas aparte grava kaj bonvena, ne nur ĉar ĝi proponas horon da tre agrabla distro, sed ĉefe ĉar ĝi renversas la arĥaikiĝintajn tradiciojn kaj kreas — verŝajne unuafoje — tipe esperantan kantoĝenron, novan eksperimenton, kiu povas ion instrui al ni. Ĝi povas instrui, ke ankaŭ la esperantista mondo lernis ridi pri si mem; kio signifas, ke ĝi fariĝis finfine adulta.

Aldo de' Giorgi.

Interlingvistika seminario: sekvinda ekzemplo.


La fakgrupo interlingvistiko-esperantologio ĉe Centra Laborrondo Esperanto en Kulturligo de Germana demokrata respubliko entreprenis pluan paŝon por popularigi interlingvistikajn konceptojn en GDR, tiel proponante al lingvistoj okupiĝi pri la lingva problemoj ĝenerale kaj speciale pri Esperanto.

En la alloga ĉebaltmara ripozloko Ahrenshoop, okazis de 1979.04.16a ĝis 19a, "Scienca Seminario pri Interlingvistiko". Oni invitis ĉiujn universitatojn kaj altlernejojn de GDR sendi interesitajn lingvistojn al tiu seminario. La invito estis riska eksperimento — ĝi estis testo. Ĉu entute reagos la lingvistoj? Se jes, ĉu la fakgrupo povos esti kapabla en prelegoj kaj diskutoj? Kiaj estos la sekvoj de la seminario?

Eĉ se neniu lingvisto estus aliĝinta al la seminario, la informmaterialo pri la temo (i.a. ampleksaj tezoj) almenaŭ atentigas pri la ekzisto de scienca okupiĝo pri la monda lingvo-problemo, pri interlingvistiko, pri Esperanto.

La testo donis surprizajn rezultojn. Anonciĝis multe pli ol la kapacito de la seminario kapablis akcepti. Partoprenis entute reprezentantoj de kvar universitatoj, tri pedagogiaj altlernejoj, kvar inĝenieraj altlernejoj, du aliaj altlernejoj, de la Akademio de la Sciencoj en GDR, de du centraj institutoj, komputila esplorcentro Robotron en Dresdo kaj de Akademie-Verlag (Lektorato pri Lingvistiko). La dudeksep lingvistoj kaj kvin membroj de la fakgrupo interlingvistiko entute aŭskultis dekunu prelegojn kaj abunde diskutis pri bazaj problemoj de interlingvistiko.

kontakto



ĝanfranko

Edistudio, Pizo, 1979

De Zamenhof ĝis Tonkin tra tiuj... kiuj esperantumas, la tuta Movado prezentiĝas en la nova muzikŝonglaĵo de Ĝanfranko, eldonita de Edistudio, Piza.

Valoras mencii, ke du universitataj profesoroj, unu docento kaj unu supera asistanto mem transprenis temojn.

La prelegojn sekvis intensaj diskutoj. Ĉiutage la fakgrupo prezentis du diversajn ekspoziciojn (antaŭtagmeze kaj posttagmeze) tiel montrante pli ol centkvindek sciencajn librojn pri la temo.

La partoprenintaj lingvistoj ne nur estis surprizitaj pri la multo, kion oni povas diri kaj montri pri interlingvistiko, ili estis tre kontentaj pri la altnivela ebleco konatiĝi pri scienca objekto ĝis tiam al ili preskaŭ tute nekonata. Ili esprimis sian fortan intereson pri similaj pluaj aranĝoj kaj materialoj. Krome montriĝis, ke ĉiuj prelegintoj de la fakgrupo kapablis plene suverene prezenti kaj diskuti interlingvistikajn problemojn kun (parte eĉ internaciskale) reputaciaj profesiaj lingvistoj.

Tiu seminario estis kuraĝa kaj tre sukcesa paŝo al plua antaŭenigo de interlingvistiko en GDR kaj plene konfirmis la ĝustan kompreneon pri la ŝlosila rolo de la scienco.

Kulturbund der DDR.

Pri virina agado.

KIAL LA VIRINOJ BEZONAS APARTAN NOVAĴLETERON?

En la Esperanto-socio, kiel en la ekstera, la virinoj ĝenerale ludas malpli aktivan rolon ol la viroj. Estas vere, ke ili estas malpli multnombraj ol la viroj — neniu scias la nunan proporcion de virinoj en la Esperanto-movado, sed laŭ statistiko farita en 1966 ili tiam konsistigis nur 24 elcentojn de la individua membraro de UEA. Se tiu cifero ankoraŭ validas, tio signifas, ke la du virinoj el la ok

estraranoj de UEA sufiĉe ĝuste reprezentas la ĝeneralan situacion. En aliaj kazoj, tamen, la bildo estas malpli kontentiga. Laŭ la Jarlibro 1979 de UEA ni trovas ke: el 70 komitatanoj, 13 estas virinoj (19 elcento); el 43 akademianoj, nur 2 estas virinoj (4,6 elcento); el 25 ĉefdelegitoj, 5 estas virinoj (20 elcento).

Estas evidente, ke multaj virinoj bezonas apartan helpon, por kuraĝigi ilin aktivi en la publika kampo. Jam ekzistas multaj naciaj virinaj organizoj kun tiu celo. Certe multaj esperantistinoj estas membroj de tiaj organizoj, sed ilia agado kutime devas limiĝi al la nacia sfero. Ili tro malofte havas la eblecon renkonti esperantistinojn el aliaj landoj, por diskuti siajn komunajn interesojn kaj interŝanĝi ideojn. Kelkaj virinoj povas fari tion nur dum la Universalaĵ Kongresoj; aliaj havas eĉ ne tiun bonŝancon. Ili bezonas forumon, kiu funkcius ekster kongresoj. Tial estas nun projektata novaĵletero pri virina agado (adreso: Anna Brennan, ĉe Nieuwe Binnenweg 197B, NL-3021 GA Roterdamo, Nederlando).

KIO ESTUS LA ĜENERALAJ CELOJ DE LA NOVAĴLETERO?

Parte la novaĵletero celus provizi forumon por tiuj esperantistoj, kiuj jam aktivas en la virina movado. Parte ĝi celus ankaŭ la malpli aktivajn virinojn, kiuj eble neniam provis esplori kaj uzi proprajn talentojn. La virinoj de la Esperanto-movado posedas unikan ilon, kiu povus ebligi al ili kunlabori en la internacia kampo. Per Esperanto ili povas rekte ekscii pri la vivoj kaj opinioj de virinoj en pluraj aliaj landoj.

KIEL VI POVAS KUNLABORI?

La projekto de la novaĵletero estis diskutita dum la Universala Kongreso en Lucerno, kaj espereble la unua numero aperos post ne longe. Via kontribuo estos tre bonvena; ĝi povus veni en formo de sugesto, komento, letero aŭ artikolo. Ĝi ne devas esti longa, do rapide verku kaj sendu ĝin! Eble vi jam havas temon. Se ne, jen kelkaj ideoj:

1. Ĉu vi jam aktivas en virina movado? Se jes, aliaj virinoj verŝajne trovos viajn spertojn interesaj. Raportu pri via agado, eble vi

Por vi kaj por viaj neverdaj amikoj.

instigos aliajn virinojn al simila agado — kaj eble vi mem trovos iliajn komentojn utilaj.

2. Neniu scias, kiom da neekspluatata talento estas kaŝita inter la virinoj de la Esperanto-movado. Eble vi mem ĉiam supozas, ke vi ne kapablas verki. Sed la novaĵletero invitas vin provi. Ne necesas longa artikolo, se vi ne kutimas verki en Esperanto — letero sufiĉas. Eble vi trovis, ke via talento konsistas ne en verkado, sed en alia kampo. Skribu pri ĝi por kuragi aliajn virinojn!

3. Kial multaj virinoj ludas nur pasivan rolon en la Esperanto-movado? Kiel helpi ilin akcepti gvidajn poziciojn? Se vi havas opinion pri tiu problemo, skribu ĝin al la novaĵletero. Aŭ se vi mem sukcesis superi tiun problemon, via sperto povus helpi aliajn virinojn.

4. Eble vi legis interesan artikolon pri virina agado en nacilingva revuo. Ĝi ne estu limigita al viaj nacilingvanoj. Ankaŭ aliaj virinoj povus trovi ĝin utila. Traduku aŭ resumu ĝin por la novaĵletero — sed ne forgesu aldoni detalojn pri via fonto, kaj havigi permeson, se temas pri traduko de kopirajta verko.

5. Esperanto estas la perfekta ilo por ebligi interkulturajn kontaktojn inter virinoj. Artikoloj pri la situacio de virinoj en aliaj kulturoj povus helpi legantojn pli objektivigi rigardi proprajn kondiĉojn, kaj eble apliki solvon jam trovitan en alia lando. Verku por la novaĵletero por sciigi aliajn esperantistojn pri la vivo de virinoj en via lando. Vi povus bazi la artikolon sur via persona sperto.

6. La novaĵletero celos atentigi siajn legantojn pri fontoj de seksa diskriminacio. Verku pri aspektoj de seksa diskriminacio, kiujn vi konstatas en via ĉiutaga vivo.

ANKAŭ POR VIROJ.

Oni ne povas influi la situacion de virinoj sen ŝanĝi ankaŭ tiun de viroj. Estas do grave, ke la viroj lernu pri la virina movado kaj komprenu ĝiajn celojn. Espereble, ili inkluzivigos multnombre inter la legantoj de la novaĵletero; kaj ili estas kore invitataj aŭdigi tie ankaŭ siajn opiniojn kaj ideojn pri la rolo de virinoj.

Anna Brennan.

“Muzika kulturo” estas serio de muzikaj aĵoj (diskoj, kasedoj ktp.) en la internacia lingvo, kiu celas produkti ion, kio samtempe riĉigu la internaci-lingvan kulturon kaj estu prezentbla al la neesperantista juna publiko sen honto.

Ĝi klopodas atingi tion per eldonado de muzikaj kasedoj kaj diskoj kun tradukoj de naci-lingvaj kaj de originale internacilingvaj, sed ne “patosaj”, kanzonoj. Tiucele ĝi akceptas kunlaboron de ĉiuj esperantistoj, kiuj kutimas kanti, ludi muzikilojn, traduki kanzonojn aŭ simple aŭskulti ilin.

La ĝisnunaj produktoj de “Muzika kulturo” estas du serioj de magnetofonaj kasedoj, akompanataj de tekstolibroj (21 cm., 60-80 paĝoj, kartonitaj, ilustritaj, por la serio “A”, 21 cm., 24 paĝoj, sur fortika papero por la serio “P”). Ĉiuj eldonoj estas distribuataj de la eldonejo “Edistudio”, casella postale 213, 56100 Pisa, pĉk. 22-8128.

La kasedoj de la serio “A” estas: Ĝanfranko, **La vojo**, ISBN 88-7036-000-8; Ĵak’ Lepuĵil’, **Danĝera ul’**;

Ĝanfranko, **Kontakto**, ISBN 88-7036-001-6.

La kasedoj de la serio “P” estas:

Ĝuljo kaj Ĝanfranko, **Horo da opozicio**, ISBN 88-7036-003-2;

Marĉela, **Venos liber’**, ISBN 88-7036-002-4.

La kosto de ĉiu kompleto (kasedo kaj libro aŭ kajero) estas 7500 liroj por la serio “A” kaj 5000 liroj por la serio “P”.

Mendante la kasedojn, bv. atenti, ke al ĉiu fakturo aldoniĝas 10 elcentoj por sendokostoj, sed ankaŭ ke mendante almenaŭ tri ekzemplerojn de la sama kompleto, oni ricevas aŭtomate rabaton de 1/3.

Renato Korseti.

Unu el la plej tiklaj fenomenoj de la itala movado dum la lastaj jaroj estas la ampleksa eldonagado, revua (Literatura Foiro), muzika (Muzika kulturo) kaj libra (Gabrielli, La Nuova Frontiera, Edistudio).

Lastatempe Edistudio entreprenis kunlaboran eldonadon kun IKS, la Internacia Kultura Servo en Zagrebo kiu interalie lanĉis kaj pluvartas la Pupteatron Internacian Festivalon. La libroserio eldonata de la duopo Edistudio/IKS konsistos el literaturaĵoj el malpli konataj kulturoj. Unua volumo, en preso, estas "Salale!" kun du komedioj kaj unu eseo el la ŝuahila (tanzana) kulturo, en traduko de Nino Vesela, kaj la dua estas "Kroata moderna prozo", ampleksega (612-paĝa) kolekto de elstaraj rakontoj.

Ŝajnas al mi interese prezenti elĉerpon de ĉi lasta verko, per unu el la plej mallongaj el la pecoj, aparte interesa pro la pdu paralelaj prezentoj de la sama okazintaĵo.

ENKETO PRI TAGMEZA MURDO

Nek mi estas verkisto, nek mi okupiĝas pri filozofio. Sed mi konsideras ke en la vivo okazas treege strangaj aferoj. Eble nur mia profesio estas tia ke mi pli ofte venas en kontakton kun strangaj aferoj, ol tio okazas al la ceteraj homoj.

Mi estas, efektive, esplorjuĝisto kaj la homoj kiuj kutime ĉirkaŭas min ne

apartenas al tio kion ni kutime nomas la solidaj membroj de la homa socio.

Nu, sed tio ne estas la afero pro kiu mi komencis skribi. Antaŭ kelkaj tagoj estas trovita la kadavro de juna virino sur unu vilaĝa vojo. Trovis ĝin kampo-gardisto, dum la kadavro estis ankoraŭ varma. Kiam li daŭrigis bicikle ĝis la unua telefono, li renkontis du maljunajn almozulojn, kiuj urĝe malproksimiĝis. Li kondukis ilin kun si, ĉar li eksuspektis ilin.

Tamen, la mortiginto jam la morgaŭon mem denunciis sin kaj la afero fariĝis tute klara. Ankoraŭ konstatigis ke la du maljunaj almozuloj estis hazardaj atestantoj de tiu krimo.

Mi pridemandis ankaŭ ilin. Unu estis blinda, kaj la alia surda. Iliaj depozicioj estis por mi tiel interesaj ke mi, laŭeble fidele, raportas ilin ĉi tie.

Mi dezirus diri nur, ke tiu kazo kondukis min al tio, ke la mondo ŝajnas al ni tia, kiom ni havas da kapabloj kaj sensoj kompreni ĝin.

Deklaro de la blindulo

Ne, ni tie vere neniel estas kulpaj. Ni nur estis irantaj en la najbaran vilaĝon al iuj niaj parencoj. Estis tre varme kaj ni kuŝiĝis en tritikon, ŝajnas al mi ke la tritiko estis jam alta, por iom ripozi.

Jes, li diris al mi ke tio estas tritiko. Li vidis kaj la tritikon kaj ilin.

Jes, mi estas blinda denaske. Mi ankoraŭ neniam ion vidis.

Ni sufiĉe bone interkompreniĝas. Li kutime parolas al mi, dum mi uzas la fingrojn. Tion mi jam ellernis. Ni estas kune jam dudek jarojn.

Ni estas maljunaj homoj, sinjoro. Ni vere neniel estas kulpaj. Estis nur forte varme kaj ni kuŝiĝis en la altan tritikon por iom ripozi. Ni manĝis lardon kaj panon. Ĉar ni estas maljunaj homoj kaj ni ne povas longe marŝi. Estis al ni necese iom ripozi.

Ne, mi vere nenion vidis, sinjoro. Mi nur aŭdis.

Estis tiel, sinjoro. Mi jam de malproksime aŭdis paŝojn kaj parolon. Mi atentigis mian amikon ke iu alvenas kaj ke estus eble pli bone kaŝirmi nin.

Ne, ni ne forkuras de la honestaj homoj, sed kiu scias kiun ja oni povas renkonti, kiam oni troviĝas sola en la kamparo.

Li diris al mi, ke neniu rimarkos nin kaj ke ni povas resti tie. La paŝoj ĉiam pli proksimiĝadis kaj tiam haltis, mi opinias ke ili haltis ĝuste ie antaŭ ni.

Ankoraŭ nun resonas al mi en la oreloj iliaj voĉoj. Li havis altan kaj siblan, preskaŭ virinan voĉon, dum la ŝia estis plena kaj treege agrabla.

Sciu, mi ne povas diri, ĉu iu estas bela. La belecon mi povas trovi nur en la sonoj.

Ni kuŝis en la alta tritiko kaj tute algluis nin al la tero. Ŝajnas al mi ke mi koleris kontraŭ tiuj homoj, ĉar ili haltis ĝuste antaŭ ni. Ili ĝenis nin.

Ne, mi ne povis distingi ĉiun ilian vorton. Sed mi opinias ke mi tamen povis sekvi ilian konversacion.

Li kriis ekscitite, kolere kaj sible, dum ŝi pli kviete respondadis.

Mi opinias ke iujn vortojn mi ne bone komprenis, ĉar mi ne bone aŭdis ilin, kaj ili neniel venis en akordon kun la aliaj.

Bone, mi ripetos al vi tiujn vortojn se mi memoras ilin.

Jen nun mi provos ripeti al vi ilian tutan interparolon.

Li diris: Vi scias ke mi ne povas vidi lin. Kaj vin kun li. Se estus estinta iu alia, tio ne tiom kolerigus min.

Ŝi diris: Vi scias ke tio ne estas vero.

Ŝi havis plenan kaj belan ridon. Mi kredas ke estis bela virino.

Ŝi diris: Ne nun. Atendu.

Li respondis ion al ŝi, kion mi ne povis kompreni. Poste ili silentis aŭ duonvoĉe parolis, tiel ke mi ne aŭdis ilin.

Tiam li diris: Mi mortigos vin. Vi scias ke mi vin mortigos.

Ŝi denove ridis. Ŝi konstante ridis.

Ŝi diris: Vi ne mortigos min. Vi ne povas esti sen mi. Estus same kiel se vi mortigus vin mem.

Tiam mi sciis ke li mortigos ŝin. Ŝi provokis lin, sinjoro. Estis io provoka kaj senhonta en ŝia voĉo.

Li diris: Serpento. Serpento vi estas. Jen kio vi estas.

Ŝi diris: Kia ajn mi estu, tamen vi ne povas esti sen mi. Dum mi povas sen vi.

Estis varme, la ŝvito fluetis de sur mia frunto, kvankam mi estis kuŝiĝinta en la ombro de alta tritiko. Kaj dum tia varmo homo ĉiam sentas la bezonon ion fari. Mi sciis ke li mortigos ŝin ĉar ŝi estis senhonta virino kaj estis io provoka en ŝia voĉo.

Li diris: Vi kuŝis kun li. Konfesu. Vi pasintan nokton kuŝis kun li.

Lia voĉo estis penetra kaj li preskaŭ kriis.

Ŝi diris: Jes, nu eĉ se mi estus kuŝinta. Do kio tiam? Kio estas tie far- ebla? Ja mi estas pli necesa por vi ol vi por mi.

Li diris: Serpento vi estas. Serpento. Vi kuŝas kun ĉiu kiu venas.

Ŝi diris: Kaj kio tiam. Ĉu ja nur kun vi mi kuŝu. Vi estas kiel kaŝtrita taŭro. Multon volas, malmulton povas.

Estis vere senhonta virino. Pro tiaj virinoj oni facile perdas la kapon.

Mi ne aŭdis ke li ion respondis. Kaj tiam ŝi rapide, rapide parolis:

Estu feliĉa ke mi volas esti kun vi. Alia ne volus eĉ tion. Estu feliĉa...

Tiam ŝi ĉesis paroli. Povas esti, sed mi ne memoras ke mi aŭdis iun krion. Sed mi sciis ke estas finite. Mi sciis ke li mortigis ŝin. Li devis tion. Viro devas tian virinon mortigi aŭ esti ŝia sklavo.

Post tio mi nenion plu aŭdis. Nur paŝojn. Ĉi-foje de nur unu persono. Kaj tiuj paŝoj estis rapidaj, treege rapidaj, kvazaŭ ili fuĝus.

Deklaro de la surdulo

Kiam mia amiko avertis min ke iu alvenas ni ankoraŭ pli kaŝiĝis. De la loko kie mi kuŝis mi vidis nur unu etan peceton da vojo, kaj tiam ili ĝuste tie haltis. Li estis alta kaj malforta, magra bruna viro, kaj ŝi estis multe pli malalta ol li, plena sed ne dika, juna bela virino. Estis vere bela virino, unu el tiuj, kiuj estas tamen la plej belaj en la lito. Ŝi estis tuta vere moviĝema, dum ŝi parolis ŝi turniĝis dekstren-maldekstren, kaj ĉe ĉio resaltis rond-aĵoj kiuj tre bele kaj alloge aspektis.

Kiam ili haltis, li brakumis ŝin, ŝi tute gluis sin kontraŭ li dum li haste karesis ŝin permane sur la tuta korpo.

Ne, neniel mi povas pensi, ke li mortigos ŝin. Krom se tio vidiĝus en iliaj okuloj. Sed iliajn okulojn mi ne vidis ĉar ili por tio tamen estis malproksime de mi.

Poste ŝi tute algluiĝis sin ĉe li, kaj ili fallasis sin en la malprofundan fosajon apud la vojo. Tie mi ne povis ilin vidi,

kaj ni dume kuŝis ne kuraĝante eĉ movetiĝi, ĉar la homoj scipovas esti tre danĝeraj, kiam oni ĝenas ilin.

Kiam ili ekstaris, ŝi estis ridetanta, dum li estis serioza. Ili ne daŭrigis la vojon kiel mi atendis, sed ili plue restis brakumitaj starante. Li karesis ŝin kaj stringis, ŝajnis al mi ke li forte amas ŝin, kaj ŝi mem adheris al li. Ŝajnis ke ili fortege amas unu la alian kaj laŭ nenio mi povus diri ke li mortigos ŝin.

Tiam ŝi komencis polme karesi lin sur la vizaĝo kaj ion rapide diris, kaj tiam subite li proksimigis la manojn al ŝia kolo kaj premis ĝin. Mi en la komenco opiniis ke tio estas nur unu speco de ilia karesado, sed tiam ŝi bluigis en la vizaĝo.

Li longe tenis ŝin tiel, kaj tiam sin-garde kuŝiĝis ŝin sur la grundon, kaj ne returniĝante, forkuris.

Neniel mi povas scii kial li mortigos ŝin. Eble li estis freneza. Sed ŝajnis, ke li multe amas ŝin.

*Vojislav Kuzmanović
el la kroata: Roger Imbert.*

Klaĉangulo.

En Italujo ĉiuj vikle protestas kaj okazas strikoj kontraŭ la koncentrado de la informrimedoj: efektive, havi je propra dispono plurajn ĵurnalojn, revuojn, ktp., permesas manipuli la informojn laŭ propraj intencoj kaj interesoj. Nura escepto estas en la esperantistaro. En Italujo ekzistas tri ĉefaj informiloj: *L'esperanto*, *Espero Katolika* kaj

Radio Romo. Ilia ĉefredaktoro aŭ respondeculo estas unika, kaj oni klaĉas, ke la redaktejo de *Literatura Foiro* preferis migri eksterlanden por ne riski saman sorton. Tamen neniu protestas kontraŭ monopoligitaj informoj. Kiel oni evitis tion? Simple! Jen la solvo: praktike ne doni informojn! Do, per kio oni plenigas la paĝojn? Per ege malnovaj novaĵoj sen plu aktuala intereso. Ĉu eblas? Jes, danke al sufiĉa malfruo pri eldonado. Sed kiel silentigi eblajn grumblojn pri tiu plurmonata malfruo de la revuo? Inteligenta taktiko estas jam de la komenco deklari sian konsenton al eventuala protestonto kaj alude sugesti ŝarĝigi lin per la tasko. Tiu ĉi lerta rimedo ĉiam efikas, precipe inter la esperantistaro. Krome, ĉiuj scias, ke inter ni estas pli facile trovi redaktoron demisiantan, pro ia ajn kialo, ol kandidaton. Lasta ekzemplo, kaj rekordo, estas la ĉefredaktoro de la naskiĝ-

onta bulteno de itala MEM, kiu sukcesis abdi-
iki antaŭ la neapero de la unua numero.
Kompreneble, la verkado de nia revuo koh-
ere estas esperantlingva, kaj tio helpas la
laborplanon malpliigante la malaprobajn, ĉar
por pluraj abonantoj ne estas diferenco inter
nelegado aŭ de freŝaj kaj diversopiniaj artik-
oloj aŭ de la kontraŭo.

Sed ĉu la nuntempa situacio estas tiel
domaĝa kiel iu povas imagi? Laŭ ni, ĝi kun-
portas plurajn avantaĝojn. Ekzemple, oni
solvis la kverelon pri la rubriko "Vivo de la
grupoj", vigne petita dum kongresaj debatoj
kaj jam de multaj jaroj forpelita, eble ĉar ne
sufiĉe literatura aŭ kultura... Ĉu havas sign-
ifon per januara revuo informi junie, ke ok-
azos kunvenon la pasintan majon? Aŭ, ke iu
samideano fariĝis prezidanto sekve de la
antaŭlastaj voĉdonadoj? Ne, kaj la grupoj
malalkutimiĝis sendi komunikojn. Sed, se ili
ne sendas la informojn, poste oni ne povas
pretendi la konceman rubrikon! Tiel la
problemo malaperis sen malkontentigoj. Oni
devas konsenti, ke delikateco ne mankas. Pri
ĝi jen alia nobla ekzemplo, ne sufiĉe konata
kaj malofta en nia mondo de lupoj: nia Fed-
eracio neniam propagandas en sia revuo sian
libroservon, por ne ĝeni konkurencon libro-
servon tie sin anoncanta. Antaŭe la gasto
kaj poste la mastro!

Sed revenante al la avantaĝoj, jen alia: ni
kongresas la tutan jaron. Por la partopren-
antoj la nacia kongreso daŭras unu semaj-
non, sed ĉiuj legantoj ĝin travivas unu jaron
dank' al la postaj raporto. Tamen ĝis nun
oni ne atingis la perfektecon, publikigante en
la antaŭkongresa numero (eble ĉar ĝi aperas
poste...) la pasintjaraĵan protokolon por helpi
kongresanojn rememori la jam voĉdonitajn
farendajojn kaj eviti denove ilin proponi kaj
aprobi. Kroma avantaĝo estas pritrakti inf-
ormojn kiel la maljuniĝantaj vinojn: oni
forigas la freŝan sed ofte akran guston, oni
eliminas plurajn maldigesteblajn enhavojn,
kaj finfine la kelo havas kutime sufiĉan
provizon, kvankam kelkfoje oni devas urĝe
sin adresi al la famkonata "kelo Korseti" kiu
laŭokaze povas liveri aŭ fortikajn vinojn
(precipe ruĝajn) aŭ komunajn kun strangaj
propraj nomoj.

Konklude, la nuntempa elektita vojo laŭ
mi estas ĝusta, sed plibonigebla, kiel mi
antaŭe rimarkigis. Verdire, mi eĉ havus rev-
olucian proponon, kiu solvus ĉiujn probl-
emojn kaj permesus gravan ŝparon de mono,
ĉe la presejo, kaj de tempo, por la verkistoj
kaj la korektantoj de la presprovaĵoj. Jen ĝi:
sendi al ĉiuj revuon kun nur blankaj, nescrib-
itaj paĝoj, tiel ke ĉiuj povu ene imag-legi
ĉion, kion ili volas, laŭ propraj pensoj,
esperoj kaj deziroj. La unueco de redaktado
fariĝus pluraleco de legadoj, eventuala mono-
polo de informado ebligus individuan liber-
econ de interpretado, la pasiva leganto trans-
formiĝus en ĝojoplenan protagoniston... Nur
la esperantista movado, futurista pro naskigo
kaj tradicio, povus pristudi tiun ĉi proponon
vere avangardan! Sed eble ĝi restos interna
ideo de

Ermes.

Hiroŝima: un'esperienza di ieri per una realtà di oggi.

Sotto questo titolo il gruppo esperantista
di Chiavari, in collaborazione con un'asso-
ciazione culturale locale, ha organizzato
un ciclo di conferenze di due giorni del sig.
Sato yasuo, già segretario dell'Associazione
giapponese esperantista per la difesa della
pace (JPEA) ed attualmente abitante in
Italia, per rendere coscienti le persone sulle
conseguenza del *gioco con le bombe atomi-
che all'idrogeno e al neutrone*, pericolo sem-
pre esistente nel mondo attuale, dove i mag-
giori Stati parlano di pace e gareggiano nel

collezionare armamenti sempre più consistenti e raffinati.

In due giorni, in effetti pesanti sia per gli organizzatori che per i conferenzieri, è stato ripetutamente proiettato un film di 16 minuti in bianco e nero, realizzato dall'Università statunitense "Columbia" unendo diversi filmati giapponesi ed americani, nel quale si possono vedere le conseguenze immediate e postume dell'esplosione della prima bomba atomica su Hiroshima il 6 agosto 1945. Il film è stato presentato una volta alle quarte e quinte classi di una scuola elementare, tre volte agli studenti di una scuola media inferiore, ed infine, nella sala comunale di Lavagna, ad un pubblico vario di oltre 180 persone.

Intenzionalmente si è dedicato il maggior tempo possibile alla presentazione del film ed al dibattito nelle scuole, perché i ragazzi devono essere educati alla realtà della vita e già da questa età diventare responsabili e coscienti del mondo che li circonda.

La presentazione è consistita in una breve introduzione in esperanto del sig. Sato, che — non conoscendo bene l'italiano — è stato sostituito nella presentazione del film e nel successivo dibattito dalla sig-ra Michela Lipari, che ha iniziato ad interessarsi al problema durante un suo soggiorno in Giappone, e che ora desidera far conoscere questo film al maggior numero di persone possibile in Europa.

È stato anche organizzato un incontro con il gruppo esperantista locale e con i bambini di una scuola elementare, che studiano esperanto sotto la guida della sig-ra Piera Raffo; per loro, il signor Sato ha gentilmente risposto a domande di ogni genere sul Giappone, e ha mostrato alcuni tipici oggetti giapponesi.

Si può concludere che questi due giorni sono stati molto fruttuosi sia per l'esperanto in generale sia per un invito ad una presa di coscienza circa i gravi problemi che l'umanità deve attualmente affrontare.

Noi speriamo che altri gruppi abbiano il coraggio di seguire l'esempio ed invitare il signor Sato ad altre analoghe manifestazioni.

Michela Sato-Lipari.

Leteroj al la direktoro.

Caro Direttore,

ovunque io vada ho occasione di incontrare molti ns. associati e tutti si lamentano perché non ricevono la ns. rivista: "L'Esperanto". A Verona, come in altri posti, il n. 10 l'abbiamo ricevuto (non tutti) verso la fine di gennaio o nella prima settimana di febbraio. Non so se attribuire la colpa alle Poste Italiane (che funzionano come tutti ben sappiamo) oppure a chi lo stampa o a chi effettua le spedizioni.

Ci sono proteste da parte della maggioranza degli associati perché la rivista è interamente scritta in Esperanto, ed in una forma poco accessibile soprattutto ai principianti, che, dopo essersi sforzati di capirci qualcosa, la buttano via senza neanche leggerla. Certamente "L'Esperanto" è la rivista per gli esperantisti, però quando viene manipolata da una esigua minoranza di intellettuali e non la si rende accessibile alla maggioranza è controproducente. È inutile che andiamo a predicare dappertutto dicendo che l'Esperanto è una lingua molto semplice e la si impara in pochi mesi, quando poi gli argomenti scritti sono solo alla portata di un'esigua minoranza, non solo, ma il 99 per cento non possiede neppure un piccolo vocabolario.

L'Esperanto si impara anche quando c'è la traduzione in lingua nazionale, tenendo presente che nel movimento esperantista non ci sono solamente diplomati o laureati, ma soprattutto gente che non è andata al di là delle medie (ed è la maggioranza). Perciò da queste colonne, noi della base lanciamo un appello ai dirigenti della F.E.I. ed al Direttore responsabile della rivista, perché ascoltano i ns. suggerimenti, altrimenti il movimento esperantista rischia di diventare un circolo chiuso di élite.

Ritengo inoltre far rilevare che un buon esperantista non è solo colui che lo parla correttamente o ad alto livello, ma lo sono soprattutto coloro che, benché non lo parlino, lo hanno introdotto nelle scuole (vedi Mariani di Cesena); ci sono anche ns. associati che, girando in lungo e in largo il ns. paese, stanno portando la voce dell'Esperanto soprattutto nel Meridione, dove direi, è quasi del tutto sconosciuto. Dopo anni di continuo martellamento siamo riusciti a sensibilizzare le scuole di Manfredonia e di Margherita di Savoia (Foggia) e gli operatori turistico-commerciali, per l'introduzione dell'Esperanto. Cordialmente,

SALVATORE ARGENTINO, Verona

Sonrevuo en Esperanto.

Jen, Kroata Unuiĝo de nevidantaj esperantistoj, en Zagrebo, Jugoslavujo, lanĉis la unuan 90minutan (duflankan) sonrevuon en Esperanto, kun varia enhavo; ĝi estis produktita en eldonkvanto de 200 ekzempleroj.

La sonrevuo tre taŭgas por grupvesperoj: kiel vi mem konvinkigos post aŭskultado de la tuto, la enhavo estas tiel elektita, ke ĝi ne malaktualiĝos pro tempopaso. Interalie estas:

– Enkonduka artikolo de T. Karlović, la respondeca redaktoro;

– Fragmentoj el la diskuto okazinta por fiksi la fizionomion de la provnumero;

– Artikolo pri Rafael Alberti, revoluciuulo, poeto kaj pentristo;

– Interparolo kun membroj de la redakcio de *El popola Ĉinio*;

– Intervjuo kun Emilija Lapenna, okaze de duobla arĝenta jubileo;

– Kuriozaĵoj el la naturo: Dahuo;

– Humurajoj;

Ni substreku, ke neniu el la menciitaj artikoloj aperis ĝis nun ie ajn. La vendoprezco (kun sendokostoj) estas 5000 liroj, kaj ĝi estas mendebla ĉe ĉiuj bonaj libroservoj.

Kunlaboro kaj sendo de opinioj, kiujn ni eventuale povos aperigi en la sekvontaj numeroj de la sonrevuo, estas dezirata.

En la sonrevuo oni volonte ankaŭ recenzo Esperanto-librojn, kiujn oni sendu al la adreso de la ĉefredaktoro: Marinko Ĝivoje, pf. 5025, YU-41040 Zagrebačka Dubrava, Jugoslavujo. Al la alia redaktoro: Tomislav Karlović, Krašička 10, YU-41000 Zagrebo, oni sendu nur brajle skribitajn kontribuajojn kaj surbendigitajn programerojn.

Marinko Ĝivoje.

La foiro de la veraĵoj

recenzoj

prizorgas clelia conterno guglielminetti

Artur Baur

**La fenomeno Svislando
Svisa Esperanto-Societo,
Romanshorn 1979**

paĝoj 144, prezo ne indikita.

Kvankam ĉi-tio povus ŝajni hereza, mi estas unu el la malmultaj esperantistoj, kiuj ne aŭtomate legas beletraĵojn en la simpla, fleksebla, nuancoriĉa internacia lingvo. Ĝenerale mi tion ne faras ankaŭ pri itallingvaj beletraĵoj, ĉar mi preferas librojn kun faktoj pli ol librojn kun rakontoj.

La fenomeno Svislando estas ĝuste unu el tiuj libroj, kiuj pruvas ke realaj faktoj estas ofte tre pli fantazi-riĉaj ol la mensoj de profesianoj pri fantazio, kiaj estas verkistoj.

Ĝi konigas al nesvisoj Svislandon, kaj la interkonatiĝo okazas pere de flue legebla rakonto, en kiu Artur Baur montras sian tutan ĵurnalisman talenton. Eĉ la ĉapitro pri ekonomio, kiu kutime konsistas el ciferoj, ciferoj, iĝas interesokapta analizo pri la mistero de la svisa riĉeco, pri kiu oni fabelas en eksterlando.

Tre ekvilibre ĉi tiu libro montras la plurajn flankojn de la svisa fenomeno, de historio tra politiko kaj ekonomio al kulturo kaj aktualaj problemoj. Sed, laŭdirinde, Baur ne nur rakontas faktojn kaj anekdotojn, li klopodas elkribri la esencon, la kialojn, la evolutendencojn kaj donas personajn prijuĝojn pri bono kaj malbono en sia lando.

Ne kredu, kara kaj klera leganto, ke vi ja konas Svislandon, ĉar vi legis pri Vilhelmo Tel kaj aĉetis svisan horloĝon. Unuflanke niaj lernejoj instruplanoj principe fortranĉas lernantojn de ĉio, kio okazis trans la limoj,

kaj aliflanke niaj nuntempaj amaskomunikiloj (kiuj, vole aŭ nevole, estas la kulturiloj por ni ĉiuj) sisteme evitas informi pri landoj aliaj ol la imperi-centraj (temas pri Usono en la kazo de Italujo).

Generale kritika rimarko altrudis sin al mia menso dum la legado, kaj ĝi laŭgrade pliigis ĝis la fino de la libro. Baŭr, fakte, tre pli multe emfazas bonajn ol malbonajn trajtojn de la svisa socio. Mi ne povas juĝi, ĉu tio dependas de nevenkebla emocia ligiteco al la lando (ĉu vi kapablas objektive priskribi viajn malvirtojn antaŭ fremduloj?). Ĉiukaze, prisentado de socia konservemo, kiu ja abundas en Svislando, ne estas objektive neŭtrala fakto. Aliflanke Baŭr eĉ klopodas pravigi la "svisajn gnomojn" (paĝo 75a), kiuj verŝajne ne estas tiel monstraj kiel oni imagas eksterlande, sed certe ili ne povas ĝui tre altan moralan apogon. Per la esprimo "gnomoj" oni aludas svisajn bankestrojn. Ĉiulandaj bankestroj matene "remetas siajn korojn en ŝtalŝrankon", kiel diras konata poeto, sed svisaj bankestroj certe posedas la plej dikajn ŝtalŝrankojn.

Baŭr ankaŭ evitas paroli pri la agado en triamondaj landoj de svisaj entreprenoj. Tiu agado estas pli kaj pli kritikata.

La ĉapitro pri kulturo, kiel decas ĉe libro por esperantistoj, estas tre informo-plena, kaj el ĝi oni povas formi al si sufiĉe klaran bildon pri la lingva situacio kaj pri la kultura situacio. Legante ĝin, oni komprenas kial sociolingvistoj ree kaj ree "uzas" svisajn lingvajn situaciojn kiel ekzemplojn. La diglosia stato de la germanlingvaj kantonoj eĉ servis kiel unu el la ekzemploj ĉe la ekesto de la termino "diglosio" mem en jam klasika artikolo de Ĉalz Ferguson de la jaro 1959a.

Por esperantistoj, kiuj interesiĝas pri sociolingvistikaj kaj etnismaj problemoj, legado de tiu-ĉi ĉapitro estas esenca. Kvankam ne temas pri "novaj" informoj, ili estas tre skeme prezentataj, kaj oni tre facile havas antaŭ si kompletan kaj ordigitan bildon.

Mi esperas, ke el tio, iu el la legantoj ricevos instigon pluesplori kaj pluverki por klarigi la surkovrigantajn konceptojn "etno", "nacio", "popolo", "lando", "ŝtato". Svislando liveras tre instigan ekzemplon.

Laŭ la rimarkoj de Baŭr oni emus pensi, ke la svisa popolo (ĉiuj loĝantoj en la lando) estas ankaŭ nacio malgraŭ lingvaj malsameco, ĉar, sendepende de lingvoj, ĉiuj svisoj estus kunligataj per historiaj, ekonomiaj kaj socipsikologiaj komunecoj. Sed kiu kuraĝos nuntempe paroli pri iu svisa etno? Kiom fakte rolas lingvo en la konsistigaj elementoj de etno? (Etno kaj nacio estas uzataj ĉi tie samsignife.)

Fine mi menciis ke, kiel konscia esperantlingva recenzanto, mi atentis pri pres-eraroj por diligente listigi ilin. Senrezulte! La uzata lingvospeco estas modele fundamenta kaj ĝueble flua. Mi nur notis dufojan strangan uzon de "vico" anstaŭ "malvirto". Temas evidente pri pretervido (ni nur esperu ke profesoro Varingjan ne kaptos la okazon por aldoni 2an signifon je la kapvorto *vic* en la eldonota Plenega Vortaro).

Renato Korseti.

Interesa statistiko.

Ofte oni parolas pri "Esperantujo", per tio komprenante la tutan nombron da esperantistoj en la mondo. Pri tiu nombro oni havas tre malsamajn opiniojn: kelkaj opinias, ke tiu nombro estas malpli ol unu miliono, aliaj estas tiel aŭdacaj, ke ili kalkulas pri 15 milionoj da esperantistoj.

Se ni estas unu miliono, 50 ŝtatoj en la mondo havas malpli grandan loĝantaron. Se ni estas 3 milionoj, 72 ŝtatoj havas malpli grandan loĝantaron. Se ni estas 5 milionoj, 92 ŝtatoj postrestas, kaj se ni estas 10 milionoj — eĉ 118 ŝtatoj; ĉio laŭ la 1978-a eldono de *Nar-var-hur*.

Ĉu ne estus interese kaj utile, havi fidindan statistikon pri la nombro da esperantistoj?

Eble ni povus inviti malgrandajn ŝtatojn, interkonsenti pri la uzo de Esperanto en interŝtataj rilatoj. Ĉiukaze io estas survoje en la Esperanto-movado. Ni estas en plena marŝo al praktika utiligo de nia lingvo.

Laŭ Mondo n-ro 113-1977, Svedujo

Nova Sento

rubriko de itala esperantista junularo

redaktas mauro nervi

viale italia 211, la spezia

IJK EN NEDERLANDO RIGARDIS EKSTEREN.

Dum la semajno inter la 20a kaj la 27a de julio 1979, okazis la 35a Internacia Junulara Kongreso de TEJO. Tiu kongreso allogis 320 partoprenantojn el dudeko da landoj al la vilaĝo Aüsterlico, centre de Nederlando.

Se unu faktoro apartigas ĉi tiun IJK disde tiuj en la lastaj jaroj, estas la specifeco de la kongresa temo kaj la kvanto de atento, kiun ĝi ricevis. Pri la temo "Interŝtataj unuiĝoj — kiucele?" prelegis kvin spertuloj, nur tri el kiuj esperantistoj. D-ro Humphrey Tonkin prelegis enkonduke, provante respondi al la titola demando "kiucele?". S-ino Akiko Woessink-Nagata prezentis ilustritan prelegon pri la lingvaj problemoj en UN kaj en la Eŭropa Komunumo. S-ro John Catling, ĉefadministranto de la ekonomia kaj socia komitato de la EK, klarigis la ĉiutagan funkciadon de la EK-instancoj en Bruselo. La junulara kunordiga oficisto por la Unuiĝintaj Nacioj en Ĝenevo, s-ro Peter Kuenstler, ofertis takson pri la grado ĝis kiu UN sukcesis plenumi la celojn kiujn oni antaŭvidis por ĝi. La Ĝenerala Sekretario de la Eŭropa Kunordiga Buroo por Internaciaj Junularaj Organizoj, s-ro Richard Corbett, ekzamenis la sociajn implicojn de la eŭropa integriĝo, kaj aparte tuŝis la problemojn de junulara senlaboreco kaj kreskanta ekonomia malegaleco ene de la EK.

La du laste menciitaj prelegantoj alparolis la kongresanojn nacilingve. Tiel rezultis fenomeno kiu devus esti superflua en Esperanto-kongreso: tradukado. Malfacilaĵojn tion prizorgi tamen multe pli ol kompensis la

aparta sperteco kaj prestiĝo de tiuj prelegantoj. La Komisiono por Eksteraj Rilatoj de TEJO, kunlabore kun la Loka Kongresa Komitato, donis tiun eksteran aspekton al la kongreso. Nome okazis paralele kun la IJK seminario kun ĉ. 30 partoprenantoj, inter kiuj troviĝis reprezentantoj de pluraj ne-esperantistaj junularaj organizoj. Post ĉiu prelego la seminarianoj, helpe de samtempa tradukado, diskutis funde la enhavon de la prelego kun la preleginto.

Krome ses laborgrupoj funkciis kadre de la kongresa temo: pri la eŭropa, la nordlanda kaj la helena unuiĝoj, pri la sekvoj de la Fina Akto de Helsinki, pri la hommediaj problemoj translimaj kaj pri la maldezirindaj aspektoj de unuiĝo. La kutimaj distraj eroj ne mankis, naskiĝis eĉ pluraj novaj, por liveri senprecedence plenan programon al la kongresanoj.

La Komitato de TEJO kunsidis kvinfoje. La komitatoj, samkiel tiuj de UEA en Lucerno, alvenis unu tagon pli frue ol la ceteraj kongresanoj, por tuj lanĉi sin en la laboron. Tiu komitato elektis novan estraron por gvidi la Organizon tra la sekvontaj du jaroj:

Stefan MacGill, prezidanto;
Bruĉjo Kasini, vicprezidanto, financoj;
Csaba Lendvay, vicprez., eksteraj rilatoj;
Thomas Bormann, ĝenerala sekretario;
Ian Jackson, eldonaĵoj;
Michael Lennartz, landaj sekcioj;
Zdravka Metz, regiona agado;
Bob Venhuizen, kongresoj;
Amri Wandel, varbado.

La komitato elektis per aplaŭdo la pasintan prezidanton, d-ro Savas Tsiturides, honoran prezidanto, kaj sammaniere donis honoran membrecon al Floreal Gabalda, pro lia plurjara laboro pri regiona agado kaj specife pro lia vigla agado en Latinameriko.

Stefano MacGill.

passporta servo de tejo

organizzazione internazionale della gioventù esperantista

al servizio dei giovani che viaggiano all'estero

Ogni anno viene edito un elenco di indirizzi di persone disposte ad ospitare i giovani che aderiscono al Servizio.

L'edizione 1979 contiene 320 indirizzi in 44 nazioni differenti, e l'adesione costa solo 15 franchi francesi (3000 lire, 7 franchi svizzeri).

Devi solo avvertire per scritto o per telefono la persona presso cui vuoi sostare. L'ospitalità è generalmente gratuita, e varia da un posto per il tuo sacco a pelo ad una camera singola.

In ogni caso, godrai dell'ospitalità prevista dagli usi locali.

Ovviamente, devi saper parlare in esperanto, ma non è difficile imparare: i fatti hanno dimostrato che l'esperanto può essere appreso

almeno cinque volte più facilmente di qualsiasi lingua nazionale.

Il materiale didattico può essere richiesto ad uno dei servizi librari sotto elencati.

L'esperanto non è solo la chiave per il Servizio Passaporto: ti apre le porte anche di molte altre attività internazionali.

La TEJO ha sezioni nazionali in 32 paesi, il suo Congresso Giovanile Internazionale si svolge ogni anno in una nazione diversa, la sua rivista *Kontakto* tratta argomenti interessanti per i giovani di tutto il mondo.

Informazioni sull'esperanto, materiale didattico e notizie sul Servizio Passaporto possono essere richieste a:

Italia FEI, Federazione Esperantista Italiana, via Villoresi 38, 20143 Milano
IEJ, Gioventù Esperantista Italiana, casella postale 210, 56100 Pisa
EDISTUDIO, via Giordano Bruno 8, 56100 Pisa
Centro di Documentazione Esperantista, via dei Sabelli 54, 00185 Roma

Svizzera Kultura Centro Esperantista, Postiers 27, 2300 La Chaux-de-Fonds
SES, Società Esperantista Svizzera, Schorenstr. 32, 4900 Langenthal
SEJ, Gioventù Esperantista Svizzera, 18 Verger Rond, 2000 Neuchâtel

o direttamente alla

TEJO, Tutmonda Esperantista Junulara Organizo,
Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 bj Rotterdam, Paesi Bassi